

BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.

CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.
— SÍDLO: PRAHA I. 842. KAVÁRNA „UNION". —
KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 88.
REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů.

Roč. I.—V. pro členy B. U. E. po K 2·20.

Svaz jednotlivců „Ligo de Bohemaj Esperantistoj", Klub Esp. v Praze (dříve „U Donátů") a Klub Esp. v Radvanicích dávají členům tuto revui zdarma.

1912. **ČERVEN-ČERVENEC — JUNIO-JULIO** **VI. 6.**

Roční předplatné: 3 K. | Ročník I.-V. po K 2·50. | **Cena tohoto čísla s přílohou: 30 hal.**

Klub Esperantistů v Praze (dříve „u Donátů") sídlí nyní v esperantské kanceláři Ústředního Svazu B. U. E. ve Vodičkově ul. 38. Schůze a esperantské konversační večírky každý pátek. Knihovna: 600 svazků. — Roční příspěvek 4 K s časopisem (2 K bez časopisu).

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost.
Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (**Bohemujo - Aŭstrio**).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.
Účet poštovní spořitelny 93.281.

* *

ČEŠTÍ ESPERANTISTÉ PŘEDPLÁCEJTE SVŮJ ORGÁN

Časopis Českých Esperantistů, *který vychází o 20 stranách s literární přílohou.* **Předplatné** *3 K (pro sdružené kluby K 2·50 při hromadné objednávce.)*

Bohema Revuo Esperantista aperados po 20 pĝ. kun literatura aldono.

N. B. **Sleva** *spolkům B. U. E. při hromadných objednávkách: Místo 3 K pouze K 2·50 (splatno měsíčně nebo předem na celý rok).*

OBSAH - ENHAVO:

PRAHA.

La tuta arda amo de Denis al la bohema nacio elradias per viva varmo el lia belega antaŭparolo al la libro „Prague“ (de prof. Hantich 1905), kiu estas entuziasma apoteozo de la bohema reĝa ĉefurbo kaj de ĝia glora historio. Rigardante la belajn bildojn, per kiuj estas ornamita la verko de Hantich, Denis denove trasentis la impresojn, kiujn li travivis, kiam li la unuan fojon admiris la ponton de Karolo IV. kaj la urbon, etendiĝantan ĉe ambaŭ bordoj de Vltava. Tiam li klare komprenis, ke ĉiu urbo havas sian animon, kiu en certaj momentoj sin konigas kaj donas al ĝi individuan fizionomion.

Firenze estas eleganta kaj subtila kiel desegnajo de Botticelli, Venezia grandioza kaj volupta kiel bildo de Tizian, Parizo estas ĉarma kaj plaĉas al fremduloj, ĉar tie spiras ĉio per la ridema agrableco kaj deziro ravi, Wien estas gaja kaj petola kiel opereto de Offenbach, sinjorino de Stael diris pri Berlin, ke ĝi ne estas serioza urbo, sendube pro tio, ĉar ĝi tro rapide kreskadis... ĝi retenis ion maltrankvilan, ĝiaj loĝantoj ne ŝajnas esti hejme kaj la restado en ĝi ne estas enuiga, sed oni tamen forlasas ĝin sen malĝojo; Moskva kun siaj pentrindaj kaj unuformaj kupoloj estas hierarĥia. Brügge kaj Regensburg distingiĝas per melankolia grandeco de ruinoj — Praha estas tragedia: ĉiu ĝia ŝtono rememorigas nin pri heroa dramo. Nenie estis la vivo pli agitata, la revolucio pli uragana, la pasioj pli sovaĝaj, la bataloj pli furiozaj kaj kruelaj. Ankaŭ nenie aliloke estis la interesoj pli gravaj kaj nenie alportis la venko al la kontraŭuloj sekvojn pli plendindajn. Praha, kuŝante ĉe la kruciĝo de du ĉefaj vojoj komercaj: unu de okcidento al oriento, el Parizo al Kraków kaj al Kiew, kaj la alia de sudo al nordo, de Venezia al Balta maro, estis fokuso, kie du mondoj renkontiĝadis kaj kunpuŝiĝadis, okcidente Romo kaj oriente Konstantinopolo, unuflanke katolicismo kaj reformacio, spirito de esploremo kaj dubemo, aliflanke ortodoksio kaj misticismo. Praha estas por la orienta landlimo de Germanujo tio, kio estis Strassburg por la limo okcidenta, granda fokuso de lumo kaj de intensa vivo. Por ke ĝi povu daŭrigi plenumadon de la tasko, kiun donis al ĝi Karolo IV. jam en la XIV. jarcento, kaj kiu konsistas el tio, ke ĝi servu kiel loko por alproksimiĝo de la antikva kaj nova Eŭropo, estas necese, ke ĝi konservu sian moralan aŭtonomion kaj profitante ĉiujn progresojn de la germana scienco, ke ĝi ne lasu sin tamen subpremi de sia potenca najbaro. Tuj, kiam ĝi

ĉesus esti bohema, ĝi ĉesus esti ĉefurbo de civilizacio, restante nur granda urbo de provinco . . . Kontraŭ la brua celado de pangermanismo Denis citas la eldiron de Bismarck: „Ĉiuj civilizitaj nacioj estas bravaj," aldonante, ke kio valoras rilate bravecon, valoras ankaŭ rilate inteligentecon. En la samtempa Eŭropo, kie la rasoj tiel ofte kunmiksiĝadis, ne ekzistas parioj. La cirkonstancoj pli malpli favoraj ĉi tie kaj tie plirapidigis aŭ retenis la spiritan evolucion, sed la naturaj talentoj ne estis pli malŝpare disdonataj al unuj ol al la aliaj. Kaj tiun nacion, kiu dum situacio la plej malfavora kaj la plej malfacila naskis virojn kiel Komenský, Dobrovský, Palacký, Tomek kaj Smetana, ĉu oni povas sen riproĉo pri maljusteco envicigi en la kategorion de la „minus habentes", de la senfortaj aŭ degenerintaj? Kio estas cetere civilizacio, krom ĝenerala progreso, estimo al la rajtoj de ĉiuj, pli facila kaj pli fruktodona laboro, pli liberaj spiritoj, pli sinceraj koroj, malpli sovaĝaj antaŭjuĝoj, moderigitaj malamoj? Vere, stranga rimedo, voli per ekstermo gajni respekton de la historio kaj dankemon de la homaro. En la tempo, kiam divido de laboro estas neevitebla kondiĉo de la produktado, stranga estas la idealo deziri la ekstermon de la malgrandaj patrujoj kaj oferi al la unuiga manio ĉi tiujn vivantajn grupojn, kies sola krimo konsistas el tio, ke ili ne volas rezigni je sia individueco. Kion profitos la mondo de tio, se malaperos Svisujo, Hollando kaj la ŝtatetoj skandinaviaj? Kia mizera paradokso voli por plimultigo de la morala kapitalo de la homaro, ke tia fokuso de la penado, penso kaj energio, kia estas la hodiaŭa Praha, fariĝu trista kaj timema nekropolo kiel Posen aŭ centro de senfruktaj ribeloj kiel Warszawa? Germanoj en Polujo ekkonis necedemon de tiu ĉi slava gento, fleksebla kaj persista, kiu de jarcentoj kontraŭstaras siajn almilitantojn, trapenetras ilin, asimilas ilin, kaj spite la leĝoj plej altgrade subpremantaj kaj spite la aranĝoj la plej malamataj forpelas ilin for de si. Bohemoj laboremaj, edukitaj en la kruda skolo de malfeliĉo, formitaj laŭ ekzemplo de siaj kontraŭuloj, de kiuj ili transprenis la kutimojn de disciplino kaj organizado, ĉu ili lasos sin pli facile cedemigi? Ili heredis de siaj prapatroj la plej ŝatindajn virtojn de pacienco kaj entuziasmo. Tial estas la restado en Praha tiom ebriiga. Blovas tie batalema spirito; en ĉiu movo vidiĝas la volo laboradi por la nacia bono, la malplej signifa gesto montras patriotismon. La atmosfero estas preskaŭ saturita de pulvo, la koroj batas pli rapide kaj la okuloj radias per pli fajra brilo. Ne estus malprofite, se multe da Francoj venadus de tempo al tempo ĉerpi tie konfidon kaj forton . . .

K. P.

LA SKRIBILARO POR LA MODERNA SKRIBARTO.

(*De F. J. Havelka, eksasistanto de la reĝa akademio en Leipzig.*)

En la muzeo por skribartajoj en Berlino, kreita de la fame konata plumfabriko Heintze & Blanckertz, mi admiris la malnovan skribilaron. Inter aliaj estis lignoskribilo, per kiu skribis Hindoj antaŭ du mil jaroj kaj kian uzas nuntempe ankoraŭ Batakroj, popolo vivanta en mezo de la insulo Sumatra. La pinto de tiu ĉi lignoskribilo estas ronda kaj oni skribas per ĝi sur arboŝeloj, uzante por tio fluidigitan fulgon. La literoj havas egale larĝan linion.

Alia skribilo el metalo kun akra pinto estas de Laospopolo el la Malantaŭa Hindujo, kiel al mi rakontis sinjoro Blanckertz. Per tiu ĉi skribilo oni gravuris la literojn en glatigitajn palmofoliojn, kiuj aspektas kvazaŭ papero: post la skribado oni truigas la foliojn kaj ligas ilin per ŝnuro, farante libron. En la nomita muzeo troviĝas kelke da tiaj libroj kaj ili havas oran foliorandon.

Lignoskribilo, per kiu skribas Bugisoj kaj Makasaroj, vivantaj sur insulo Celebes, havas jam larĝe altranĉitan pinton kaj la literoj havas fadendikan kaj larĝan liniojn. Ĝenerale oni povas diri, ke la karaktero de la literoj rezultas ĉiam de la materialo per kiu ili estas skribataj. En la lando inter la riveroj Eŭfrato kaj Tigrido estas multe da argiltero, tial la Babilonanoj skribis siajn literojn sur argilaj tabuloj per bambuaj kanoskribiloj. Jen estas la karaktero de kojnoliteroj donita per la argila materialo kaj bambua kano. En malantaŭa Hindujo oni skribas sur palmaj folioj per metala skribilo siajn ornamajn literojn. En Siamo troviĝas sufiĉe da mastiko, tial la Siamanoj skribas per kreto aŭ per krajono. Egiptujo estas konata pro sia riĉeco je papirusaj arbetajoj. Memkompreneble la Egiptoj skribis sur folioj de papiruso per malmolaj, senfibritaj bastonetoj, kiuj similis al peniko, siajn hieroglifojn. Mahometanaj popoloj skribis kaj ankoraŭ skribas per bambua kanoplumo siajn mirinde belajn skribajojn. La eŭropaj popoloj uzis por la skribado plumtrunkojn de ansero, cigno kaj aglo. En Ĥinujo, Japanujo kaj Koreo oni skribis per peniko sur silka papero.

Alois Senefelder, la eltrovinto de litografio, konstruis ankaŭ metalan plumon por desegnado sur la litografia ŝtono. La angla industrio fabrikadis poste metalajn plumojn por skribado sur papero, kiujn ni uzas ankoraŭ nun. Per tiuj ĉi plumoj estis kreita nova skribkaraktero, nomita „écriture anglaise“, kiu baldaŭ malplaĉis en Anglujo kaj la plumoj kaj presitaj modeloj de la literoj estis fabrikataj nur por la eksporto. La malbela „écriture anglaise“

estis en niaj landoj multe ŝatata kaj ĝi estas ĝis la nuna tempo uzata. Kiel mi jam en la artikolo „La skribarto“ diris, venis nun bona reformo denove el Anglujo, kiu baldaŭ venkos, kaj ĉiu skribos, kiel en la pli frua tempo, tipe kaj karakterize. Ekzemple en Germanujo estas jam pri la moderna skribmaniero instruate en diversaj popolaj, burĝaj kaj mezaj lernejoj, krom tio en la artmetiaj, fakaj kaj komercaj lernejoj — eĉ en la altaj komerclernejoj kaj artistaj akademioj.

Niaj bildoj montras novajn metalajn plumojn „Ly“, „To“, „Ato“, „Redis“, „Mi“ kaj diversajn skribilojn por la artskribado, nomitajn „Lyd“, „Midis“ („Tingta“, „Krott“, „Keleni“), kiuj estas fabrikataj de la firmo Heintze & Blanckertz en Berlino.

EL MONTOJ KAJ VALOJ.

Libro negranda, sole 165-paĝa, sed en ĝi kiom da materialo! Ĝi bolas per la vivo, per la vero — „mi scias, ke poeto mi ne estas, sed mi priskribas aferojn bone konatajn kaj mi klopodas diri en maniero komprenebla multon, diri la veron“ skribas la aŭtoro pri si mem en la antaŭparolo. Kaj vere, nur el tiu ĉi libro ni rekonas kaj eksentas la nudan veron pri la rilatoj hungariaj. Legante, oni plorus, oni la pugnojn kuntirus, oni laŭte krius. Sed iam eĉ ne tion — sole ekridi oni povas, nenion fari alian — —. La magiara furiozado kontraŭ Slovakoj limtuŝas la paroksismon, la frenezecon. Tralegu nur la skizon „Ili volas kanti“ — kiel advokato dr. Samko volas en Tisovec jam de la jaro 1879 fondi senartifikan, modestan societon de kantistoj, kiel la magiaraj oficoj jam de post tiu jaro rifuzas unu lian petskribon post la alia, unu kun motivigo „ke la kantistoj povus pro la kantado ricevi grandajn laringojn kaj kropon“ kaj la lastan kun noto, kiu meritas, ke ĝi estu tuta represita: „Pere de oficoj ni eksciis, ke dr. Samko havas virbovon el Svisujo, beston sovaĝan. Se la starigo de kantista societo estus permesita, certe multaj kantistoj venadus al la posedanto de la virbovo kaj la vivobolanta besto povus multe da ŝtatanoj kornovundi eĉ piedfrapi. Tial nek la virbovo nek la kantista societo estas permesata.“

Se tiu ĉi sola skizo estus tradukita en diversajn lingvojn kaj publikita en ĉiuj mondjurnaloj, ĝi klarigus al la mondo pli multe la situacion en Hungario ol grandaj verkoj. Estus penvalore tion provi. Neniu en la mondo ne estus impresita.

Ho jes, la magiara „insulo de Libereco“! Kiu ne kredas tion, iru en Hungarion — kiel Scotus Viator — tie oni instruos lin, se oni havos la rajton lin persekuti.

Kaj ni? — — Kion ni kapablas? — almenaŭ morale helpi.

(Ĉerpita el samnoma libro.)

TRANSKAPIĜADO. Sur deklivo super la rivero Váh paŝtis knaboj ĉevalojn kaj faris transkapiĝojn. „Kion vi faras, knaboj?“ mi demandis, volante ekscii kiel nomas Slovakoj la transkapiĝon.

„Preval'ujeme baranov“ *) diris unu el ili, kaj sidante sur la tero li levis la krurojn kaj transkapiĝis malantaŭen.

„Tio estas valaĥa **) transkapiĝo,“ instruis min la paŝtisto, „kaj jene ĝi estas pli facila.“ kaj transrulis sin kapantaŭen.

„Knaboj, kiel vi preĝas en la lernejo, slovake aŭ magiare?“

„Antaŭ la instruado magiare, post ĝi slovake.“

„Mi estas el Moravio, magiare mi ne scias, neniam ankoraŭ mi aŭdis la magiaran ‚Patro nia‘, preĝu magiare,“ mi diris al unu.

La knaboj ridis, kaj preĝi volis neniu.

„Nu, ci estas la plej aĝa, faru al mi tiun komplezon.“

La plej aĝa knabo ridante kaj sidante sur la tero komencis: „Mi atjank, ki vadj menj-njekben . . .“

Pro rido li ne povis daŭrigi.

La dua daŭrigis ankaŭ ridante: „szentelteśik meg a te neved . . . ledjen meg . . .“

„Malbone, malbone!“ krias la knaboj, „li ellasis: jöjjön el a te orsagod . . .“

La knaboj ridis senbride, kaj unu, rekomencinte: Mi atjank, ki vadj . . ., transkapiĝadis dum tio, kaj ĉiuj ceteraj knaboj petole kriante la magiaran „Patro nia“, sin ruladis malsupren al Váh.

Kia spektaklo! Mi enpensiĝis super tia „Patro nia“.

La knaboj refoje supreniris al mi. Tiam mi diris al la plej aĝa: „Faru al mi la komplezon, kaj diru nun la preĝon slovake, kiel cin instruis la panjo.“

La knabo ĉesis ridi, stariĝis, deprenis sian larĝrandan ĉapeleton, kaj kunmetinte la manojn, preĝis: Otče náš, ktery si na něbesiach, posväť sa meno tvoje, prijď královstvo tvoje, bud vol'a tvoja, ako v něbi tak i na zemi, chlieb náš vezdejší daj nám dnes . . .

Silente mi rigardis flanken, kaj kiam mi turniĝis al la ceteraj knaboj, mi ekvidis, ke ĉiuj, la kapojn havante nudigitaj, mallaŭte preĝis.

Sinjoro Aponyi,***) vidu, kian valoron havas la gepatra lingvo!

Laŭ Karel Kálal: N. V.

---

*) Laŭvorte trad.: Ni rulas virŝafojn. — **) Valaĥoj (Bohemoj kun propra dialekto) loĝas en Moravio apud la rivero Bečva. — ***) Ministro de instruado, kiu enkondukis en la eklezi-ajn slovakajn lernejojn la maksimumon de la magiara lingvo, — kvankam li mem estas laŭdevene Slovako.

Z CELÉHO SVĚTA.

Kraków (elp. Krakuv), urbo de la nunjara kongreso Esperantista, estas urbo tre antikva kaj tre rigardinda. Ĝi estas ĉefurbo de la aŭstria parto de dividita Pollando, kaj jam de pratempo ĝi estis centro de la pola kulturo, estante de ĉiam ĉefurbo de suda Polujo. Por ni, Bohemoj, la urbo prezentas tiom pli multe da intereso kaj jam pro tio ĝi meritas esti vizitata, ĉar ĝi per siaj memorindaĵoj je ĉiu paŝo rememorigas nin pri nia bohema historio, kiu estis ja en ĉiuj tempoj intime kunligita kun la historio de Pollando. Kiel ofte ambaŭ sendependaj popoloj havis la saman reĝon, kiu loĝis jen en Praha, jen en Kraków — kaj tiukaŭze ni en la pola ĉefurbo trovas tiom da analogio kun nia Praha, precipe kun ĝia historia parto — Malnova urbo, Malá Strana kaj Hradčany. Precipe la reĝa kastelo Wawel (bedaŭrinde ruinigita de la longjara uzado kiel kazerno) kun la riĉa katedralo prezentas sin al ni same, kiel nia Hradčany; en la katedralo mem ni povas vidi kelkajn monumentojn ankaŭ el la bohema historio.

La urbo mem estas tre bela, kaj tiun ĝian econ plimultigas en granda mezuro arangô, kiu malofte estas trovebla: la tuta interna urbo estas ĉirkaŭata de larĝa zono de parko — „la plantacioj“ — kiuj provizas la urbon ĉiam per freŝa aero kaj servas ĉiutempe kiel tre agrabla promenejo. La urbo havas kelkajn tre riĉe konstruitajn antikvajn preĝejojn kaj monaĥejojn, du teatrojn kaj ĉiufakajn lernejojn. (Petu la gvidlibron pri Kraków de la Kongresa komitato.) Ankaŭ simplaj kaj komfortaj hoteloj, tre puraj kaj moderne aranĝitaj estas disponeblaj.

La kongresa komitato zorgas tre diligente pri tio, ke la kongreso estu kiel eble plej bone aranĝita, kaj ke tie trovu kiom eble plej multe da oportuneco ĉiuj, kiuj ĝin vizitos, kaj ĝi esperas precipe multnombrajn vizitojn el Bohemujo, kiu estas ja sufiĉe proksima. (La vojaĝo el Praha al Kraków daŭras 12 horojn kaj kostas: per rapida vagonaro III. klaso K 21·80, II. K 35·40; per la persona III. K 17·30, II. K 27·50.)

Poslední oběžník kongresního výboru oznamuje ustavení dvou výprav U. E. A., které vyjedou z Paříže a z Lyona; obě sejdou se v Curichu a společně přes Vídeň pojedou do Krakova. Ve Vídni budou uvítány místními Esperantisty, se kterými 9. srpna nastoupí další cestu. Vídeňští Esperantisté připravují řadu výletů a slavnostní večer na počest cizích hostí. — Sleva na rakouských drahách platná týden před a týden po kongresu: při jízdě rychlíkem platí se cena vlaku osobního, při jízdě osobním vlakem platí se poloviční cena rychlíku. Přihlášeným bude zaslána zvláštní legitimace opravňující ke koupi lístku za cenu sníženou. — Subvence udělené sjezdu: městská rada krakovská 5000 K, ministerstvo veřejných prací 1000 K, krakovský syndikát obchodníků

200 K; podporu slíbil i Svaz turistický a Obchodní komora. — Ubytování: Poukázky na byt, vydávané přihlásivším se kongresistům, nenutí ke stravování v témž hotelu, kde bydlíme: výbor jest zodpovědným za byty, které jeho prostřednictvím byly doporučeny a jest proto vhodno již nyní si byt zamluviti (s poznámkou, chceme-li se stravovati v jídelně vegetárské).

Prozatimní program kongresu:

V neděli 11. srpna: Zahájení sjezdu; společná večeře. — V pondělí: Schůze. Večer slavnost. — V úterý: Výlet do Věličky. Prohlídka města, večer přednášky s promítanými obrazy. — Ve středu: Schůze. Večer představení v městském divadle („Mazepa") a v divadle novinek („Čio en ordo", kabaret a j.). — Ve čtvrtek: bohoslužby s esperantským kázáním v katolickém a protestantském kostele. Veřejné cvičení esperant. „Červeného kříže". Udílení cen literárního konkursu. Večer ples. — V pátek: Schůze. Večer divadelní představení (viz středu). V sobotu: závěrečná schůze kongresní. Večer koncert.

Po skončení kongresu v neděli dne 18. srpna: Přehlídka krakovské posádky u příležitosti 82. císařských narozenin. Výlet do Zakopaného a do Tater. Kongres katolíků-esper. v Budapešti. Tamtéž I. národní sjezd Esperantistů maďarských.

Kongresní výbor se doslechl, že jsou prý kýmsi šířeny nepravdivé zprávy, jako by chtěl uspořádati vedle kongresu nějaký projev politický. Protože podobná, zřejmě nepravdivá pověst mohla by míti nepříjemné důsledky, cítí výbor povinnost prohlásiti, že pořádá mezinárodní, ryze neutrální kongres, nikoli však nějakou národní manifestaci.

Podle posledních zpráv dovídáme se, že na programu divadelních představení bude též opera „Halka". Pro literární soutěž sešly se 53 práce, a to 27 básní, 15 děl beletristických a 11 vědeckých, většinou z řad německých Esperantistů. — Na žádost vídeňského ústředí „Centra Viena Esperantejo" připraví c. k. tabáková regie pro kongresní hosty zvláštní krabičky vybraných druhů rakouských doutníků. Krabičky budou vyzdobeny pohledy na Krakov s esperantskými nápisy a budou prodávány pouze v přijímací místnosti sjezdové. — C. k. ministerstvo veřejných prací vyšle ke sjezdu zástupce kinematografické firmy Pathé Frères, aby zachytil všechny důležitější scény z kongresu. Kdo nemůže se sjezdu súčastniti, může se alespoň těšiti na snímky, které budou v celém světě předváděny. Zajisté tento podnik bude pro Esperanto nejlepší propagandou!

* *

Neochabující **rozkvět Esperanta** dokumentují přečetné kursy ve všech zemích. Tak na př. v Paříži vyučuje se mu v 62 kursech (pařížský spolek má 15 odborů, v okolí existuje na 30 spolků), v Antverpách v 9 kursech, krom toho v kursu pro členy Červeného Kříže a pro městskou a přístavní stráž. — **V Rusku,** kde známou aférou Esperantisty gen. Postnikova bylo naše hnutí před úřady značně poškozeno, jest vše již opět v pravidelných kolejích; 14 měst má již nové spolky a ve 30 konají se kursy. — Na ostrově **Samosu** vyučuje se Esperantu officielně 1740 žáků ve školách 31 měst. Kněžna Helena jest horlivou Esperantistkou a před nedávnem zavražděný kníže A. Kopasis byl rovněž naším příznivcem. — Na městských školách **v Janově** navštěvuje kursy Esperanta

200 posluchačů. — Účastníkům mnohých kursů **dostává se i odměn**, jako na př. v Barceloně, kde ředitelství pouličních elektrických drah zvýšilo plat průvodčím, kteří ovládají Esperanto. — Francouzský ministr vyučování věnoval každému účastníku kursů v Sorboně medaili. — Příštího roku budou udíleny odměny francouzským žákům, kteří prokáží nejlepší znalost Esperanta, z daru 20.000 Fr., které k tomu cíli věnoval světoznámý továrník pneumatik Michelin. — **Ve Vídni** koná se kurs Esp. pro důstojníky a vojenské úředníky, řízený intendantem Lohnerem, který přednášel s velikým úspěchem o významu Esp. pro vojsko. (Viz v „Pražském Illustr. Kurýru“ ze dne 12. VII. vyobr. učebny.) Text jeho přednášky otiskla revue „Danzer's Armee-Zeitung“ ve třech pokračováních (č. 22, 23, 24, 1912). — Za předsednictví presidenta **Spojených Států** Tatta byla na VII. valné hromadě Červeného Kříže ve Washingtoně proslovena přednáška o Esperantu. — Jest známo, že **v Sasku** vyučuje se Esperantu na mnohých školách a že v Drážďanech jest založena i státní esperantská knihovna. Nyní bude zavedeno i vyučování esp. těsnopisu na účet státní pokladny. Svolení k tomu obdržela od ministerstva vnitra král. stenografická kancelář. — **V Šanghaji** bylo účastno veřejné přednášky o Esp. 500 osob. Mluvili: K. Č. Sun a Kan-Konfu, zakladatel a předseda Svazu čínských socialistů, ruský advokát dr. Strumenski, Lu Si-Cin a K. Č. Šan, delegáti UEA. Nový ministr národních škol Isai chce **v Pekingu** otevříti officielní kursy Esp. V Šanghaji vyučuje se ve čtyřech kursech. Předsedou Svazu čínských Esp. jest býv. president republiky Sun Jatsen. — Britský **ministr války** Lord Haldane přijal v audienci Edm. Privata a vyžádal si od něho podrobné informace o Esperantu. — Městská rada **v Charleroi** věnovala 200 Fr. místnímu spolku, aby byly rozděleny nejpilnějším žákům esp. kursů, kteří mají použíti těchto odměn k návštěvě letošního národního kongresu esp. v Gentu. — **V Châlon s S.** věnoval výbor karnevalových slavností 250 Fr. klubu Esp. na výzdobu allegorického vozu esperantského. — K návrhu školního rady vyznamenal **ministr vyučování** prof. Payebina v Lons-le-Saunier (ve Francii) bronzovou medailí za vyučování Esperantu na škole již po dobu čtyř let. — **Bratři Schwarzové**, známí pražské veřejnosti svým žertem „Rozbité zrcadlo“ (Variété 1911), mluví na scéně divadla v Sheffieldu Esperantem. Světový svaz „Varietea Esperantista Ligo“ čítá již 800 členů. — Ve středisku zimních sportů ve Švýcarsku **v Davosu** byla snaha tamnějších stoupenců — propagovati Esperanto při známých únorových slavnostech — korunována úspěchem: jejich „esperantské saně“ obsazené příslušníky různých národností, byly vyznamenány cenou. — **V Americe** bude příštího roku pořádán sjezd světového spolku studentského „Corda Fratres“ v Ithace. Členové studentských spolků již pilně studují Esperanto, aby se mohli dorozuměti s delegáty evropských spolků, kteří již Esperanto ovládají. — **V Chicagu** uspořádali Esperantisté v budově West Park Klubu propagační schůzi s pestrým programem. Mezi členy spolku jest prý velmi značný počet Čechů. — **Na Kubě** jest sdruženo 450 Esp. Místní časopisy jsou našemu hnutí velmi příznivy. — Pořadatelstvo slavnosti „Montamara festo“ **v Tacomě**, o níž jsme již psali v posledním čísle, dalo esperantskému spolku k disposici největší sál svého domu, kde budou pořádány během slavnosti schůze esperantské. Výbor věnoval 360 K na vypravení esperantského vozu ke slavnostnímu průvodu. — V arménské

škole v Tabrizu (**Persie**) učí se Esp. 70 osob. — Spolek v Tomsku (**v Sibiři**) čítá přes 200 členů. — Parrishovy esp. přednášky o Kalifornii **ve Švédsku** byly opět velmi četně navštíveny: v Helsingborgu 300 osobami, v Borasu 600, v Götteborgu 300 a ve Stockholmě 200. — Ministerstvo války **v Rakousku** upozornilo důstojnictvo na význam Esperanta. — Předseda **portugalského** Červeného Kříže oznamuje gen. Priouovi, který s gen. Sebertem a viceadm. Baylem upozornili jej na význam Esp. ve válce, že dal vytisknouti v 10.000 ex. a rozdati mužstvu portugalské „Klíče C. K." — Též **turecký** C. K. (půlměsíc) doporučil učení se Esp. svým členům, kteří súčastňují se italsko-turecké války. — Mezinárodní liga esp. **poštovních** úředníků (Ildepo) založená před rokem v Drážďanech, pracuje vytrvale na vytčeném cíli: vydáváním věstníku „Pošta Esperantisto" sdružila již na několik set členů, jichž předsedou zvolen A. Behrend, vyšší pošt. praktikant v Břeclavě (týž pracuje na podrobné něm., fr., angl. esp. terminologii poštovní). Dnes sdružuje již tato liga i svaz německý a ruský. Před nedávnem vydal G. Chavet zajímavou brožuru: ‚Proč mají se poštovní úředníci učiti Esperantu? (franc.).

25-leté jubileum Esperanta oslavili jeho přátelé ve všech zemích. Z nesčetných zpráv o těchto slavnostech zasluhuje zvláštní zmínky slavnost pařížského spolku na radnici V. okresu, pořádaná sdružením „Zamenhofa Artista Adeptaro". — V Sabadellu ve Španělsku sdružené spolky del Vallés sehrály na jevišti v přírodě za spoluúčinkování městské kapely známé drama „Mistero de Doloro", které s nadšením bylo přijato na V. Kongresu v Barceloně. Městská rada pojmenovala toho dne jednu z ulic **ulicí Zamenhofovou**. — Nekonečná jest řada článků, které byly ve všech světových časopisech u příležitosti jubilea Esperanta uveřejněny.

Pátý kongres britských Esperantistů v Portrush konal se koncem května pod protektorátem a za osobního předsednictví hraběte de Aberdeena, který též proslovil přednášku Esperantu velmi příznivou. Přes 200 účastníků bylo přijato na radnici, kde prosloveno několik propagačních řečí (Dr. Martin, Kol. Pollen, Mudie, Dr. Johnston a j.). Druhého dne pořádány bohoslužby s esperantským kázáním Rev. R. P. Mereditha. Kongres pořádán v radnici za předsednictví kol. Pollena, který po sedm let stál v čele britského hnutí esp. Příští sjezd bude pořádán v Eastbourne 1913. Předsedou zvolen H. B. Mudie; týž věnoval britskému svazu k účelům propagačním 2400 K. Sjezd byl zakončen výletem do Dublina, kde Mudie uspořádal veřejnou propagační přednášku za předsednictví rektora university. — Začátkem června konali **škotští Esperantisté** sedmý národní sjezd v Montrose. Na thema: „Služby, které učencům prokazuje Esperanto" promluvil prof. dundeeské university Patrik Geddes. Sjezdu, obeslanému 180 osobami, předsedal J. D. Simpson.

LEGANTE KOMPRENU.

Multe da vortoj estas bezonaj, por ke unu vorto estu revokita.

Torento falanta en abismon, faras pli multe da bruo ol rivero ruliganta sian akvomason al la maro.

Kiel devon oni konsideras ĝenerale tion, kion faru la aliaj.

Trovi amikon estas malfacile, sed pli malfacile estas la trovitan konservi.

La dornoj pli longe daŭras ol rozoj.

SEN TITOLO.

ĈU ESTI AŬ NE ESTI? Sub tiu ĉi titolo ni skribis en la lasta n-o pri la projektata centra organizo esperanta. En la tuta mondo oni nun pridiskutas tiun ĉi temon, al kiu en kelkaj gazetoj oni dediĉas pli multe da atento ol al la kongreso mem. Rimarkinda estas la letero de nia Majstro (en „Pola Esperantisto“), kiu diras, ke li mem favoris la ideon de Ĝenerala Organizo, sed ke li ne volas plu partopreni en la diskutado. Li atentigas pri tio, ke li esprimas per la letero ne sian deziron, sed nur sian opinion, ĉar lia deziro estas nur unu: ke la Esperanta afero vivu kaj progresu sane, en kia ajn maniero tio estas. Alia tre grava momento en tiu ĉi historio estas decido de la brita kongreso esp., kiu, konsiderante la demandon nematura, rifuzis pagi por la nuna jaro ian kotizaĵon. (Samsencan decidon faris la ĝenerala kunveno de nia Centra Asocio B. U. E.). Kiu volas pli detale informiĝi pri la plej nova stato de tiu ĉi tuta demando, tiu devas tralegadi la artikolojn de la gazetoj: Pola Esperantisto, Germana Esperantisto, Holanda Pioniro, La Ondo de Esperanto (por) kaj Esperanto, Lingvo Internacia, Le Monde Espérantiste, Danubo (kontraŭ), The British Esperantist notis la faktojn kaj same Oficiala Gazeto Esp. Post apero de la broŝuro „Kiel nin organizi“ de Hodler (por U. E. A.) aperis ankoraŭ alia broŝuro: „La internacia organizo de la Esperanto-movado“ de Dr. Smulders (Prezo 10 sd. Nederlando, Den Haag, Prins Hendrikstraat 93. Ĉe s-o Sleijffers). En tiu ĉi broŝuro klarigas la aŭtoro siajn ideojn kontraŭ la U. E. A.-propono.

Laŭ eraroj oni lernas! Ĉiu homo havas la rajton uzi Esperanton laŭvole, eldonadi esperante skribitajn verkojn kaj apliki la scion de la lingvo por ĉia celo. Tion bedaŭrinde trouzas kelkaj aŭtoroj de verkoj esperantaj, kiuj, ne sciante sufiĉe bone la lingvon, tamen jam verkas en ĝi librojn kaj presigas ilin. Se ili havas la rajton tiel fari, tio ne signifas ankoraŭ, ke la legantoj havas la devon laŭdi ĉion, kio en Esperanto aperas. Male estas bezone, ke la recenzistoj kaj kritikantoj gardu la lingvon per sia justa kritiko antaŭ tiaj amikoj, ĉe kiuj la bona volo superas la sufiĉan scion. Se oni timas pro iaj kaŭzoj laŭmerite mallaŭdi ilin, tiam oni almenaŭ per tio servu Esperanton, ke oni ne aludu en bibliografio de niaj gazetoj la verkojn tiel malbone skribitajn. Se la aŭtoro kaŭzis al si per sia propra kulpo domaĝon materialan per la eldono de senvalora verko, oni ne helpu, ke lia verko kaŭzu ankoraŭ moralan domaĝon en la vico de la legantoj, inter kiuj estas ja multe da komencantoj ne spertaj pri tio, ke en Esperanto povas aperi ankaŭ verkoj erarplenegaj; ili opinias, ke same, kiel en la naciaj lingvoj, la stilo literatura estas aŭ klopodas esti imitinda, modela.

Bedaŭrinde aperis ĉe firmo D. van Sijn & Zoon en Rotterdam grandampleksa libro „Ostlorn“, tradukita el la holanda lingvo de M. J. Wessel. La euhave belaj vilaĝaj skizoj de S. Ulfers perdas la tutan ĉarmon pro sennombra amaso da gravaj stilaj kaj gramatikaj eraroj. Sur 294 paĝoj estas kelke da centoj da eraroj kaŭzataj sole de nescio de la lingvo (krom la preseraroj). Ni tre dubas, ĉu la tradukinto tralegis almenaŭ unu verkon de Zamenhof, estas ja duba, ĉu li tralegis eĉ la solan Fundamenton! Multaj, ofte ripetiĝantaj kaj citindaj eraroj tion pruvas, sed vere ni ne scias, kiujn pli frue elekti kaj por citi ĉiujn, mankas la loko. „Lingvo Internacia“ bezonis por *justa* recenzo multe da paĝoj.

Sed kion oni diru pri seriozaj revuoj esperantaj, kiuj en sia recenzo ne atentigas pri la eraroj aŭ eĉ kuraĝas laŭdi tian verkon, kiu kripligas nian lingvon!

Antaŭ kelke da tagoj aperis, bedaŭrinde en 10.000 ekzempl. „Ilustrita Gvidlibro tra Budapeŝto“, propagandilo de Géza Nyulászy de Czaholy. (Ni ne aludas ĉi tie la samtempe aperintan „Gvidlibron tra Budapest“ de Dr. Béla Rácz.) La verko enhavas preskaŭ pli multe da eraroj ol da linioj. Ili estas tiom gravaj, ke tre ofte oni eĉ ne povas diveni la sencon de la frazo. Por montri la karakterizan stilon, ni citas sole la sekvantan frazon: „Mi jam mem ankaŭ multfoje aŭdis kaj legis, ke Eŭropo havas tri ravan kaj sorĉantan lokon: Neapolo, Konstantinopolo kaj Buda, kioj estas indoj por ekvidi Mi ne volas, ke miaj karegaj gesamideanoj eventuale, se ili ne estus konanta de ĉi tiojn, evitu nian urbon, kiam ili ekiras vidi la mondon.“ Ni tre bone scias, ke niaj hungaraj samideanoj perfekte posedas Esperanton, kion pruvas cetere la alia gvidlibro, kaj pro tio estas granda domaĝo por nia afero inter Hungaroj, ke aperis tiu ĉi dekmilekzemplera kvintesenco de eraroj! Ĉu oni refoje legos en iuj e s p e r a n t a j gazetoj, ke „la kelkajn preserarojn la leganto facile korektos“?!

Literatura jubileo. Granda kvanto da famaj kaj de ĉiu inteligentulo legindaj libroj de la tutmonda literaturo estas ofte eldonataj — se ili aperas tradukitaj en lingvojn de malpli grandaj nacioj — en aranĝo tiom luksa, ke ili restas neatingeblaj de la plej vasta publiko. La ĉiam kreskanta nombro de bohemaj legantoj deziras legajon varian, ĉiuflankan. Kaj da legantoj estas milionoj! Memoru, ke en la tuta bohema nacio vi trovos apenaŭ 2 % da analfabetoj! La soifon pri riĉa kaj nekara biblioteko, kiu ebligus al ĉiu Bohemo sekvi egalpaŝe la animan evoluon de la ceteraj nacioj, estingis la „Ottova Světová knihovna“ (Mondbiblioteko de Otto), kiu antaŭ 15 jaroj komencis per siaj 20-heleraj volumoj konatigadi la boheman leganton ne sole kun la perloj de la literaturo nacia sed ankaŭ kun ĉiuj gravaj verkoj de la mondliteraturo. Antaŭ nelonge eliris en la biblioteko la 1000-a volumo: sur la ĝis nun eldonitaj 72.000 paĝoj estas kolektitaj ideoj de tri cent aŭtoroj, skribintaj siajn verkojn en 28 diversaj lingvoj: la malnova kaj nova bohema, franca, rusa, angla, germana, itala, pola, serbokroata, norvega, hispana, bulgara, slovena, malgrandrusa, sveda, dana, hungara, luzacio-serba, rumana, slovaka, katala, portugala, nov-armena, ĉuda, litova, malnov-hinda, latina, antikvo- kaj novogreka. Kvarono de la verkoj traktas pri temoj sciencaj. La biblioteko finante la dekan centon de siaj numeroj povas fiere montri la rezultaton de sia ĝisnuna laboro, kiu ĝin pravigas esperi konstantan favoron ĉe la bohema legantaro.

La Ĉekbanko Esperantista (adreso: Merton Abbey, London, S.W.) c e l a s unue la f a c i l i g o n d e l a p a g o j inter la diversnaciaj Esperantistoj kaj komercistoj kaj due prepari la vojon por la ĝenerala akcepto kaj e n k o n d u k o d e i n t e r n a c i a m o n u n o. La regularo estas represita en la nunjara Poŝkalendaro; ĉiujn petojn pri informoj respondos la banko.

La rilatoj internaciaj estas subtenataj per fondado de organizajoj, kies agadkampo ne limiĝas je tiu aŭ alia lando, sed kiuj celas la tutan civilizitan mondon. En Germanujo lastatempe du similaj societoj estis fonditaj: En München „La Ponto“, peranta ĉiajn informojn sur la kampo de la scienca laboro. Ampleksa

libro eldonita ankaŭ en Esperanto konatiĝas nin kun la programo de tiu ĉi informejo, kiu helpas akceli ĉion, kio rilatas praktikan unuecon: la uzadon de helpa lingvo, de samformateco de presaĵoj ktp. Arhivo, adresaro kaj muzeo de la instituto fariĝos sekve kvazaŭ tutmonda enciklopedio. En Germanujo eklaboris samtempe „Asocio por la internacia interkompreniĝo", kiu elektis kiel sian taskon propagandi ĉion, kio amikigas la naciojn kaj malebligas la militojn. (Informojn detalajn sciigas prof. Dr. O. Nippold en Oberursel a. Taunus.) En Svisujo laboras super fondo de „Internacia ordo por etiko kaj kulturo" prof. Dr. A. Forel, kies simpatio al Esperanto estas konata el lia lasta, scienca verko, en kiu li laŭde priparolas nian helpan lingvon. En formo de „hejmoj" kuniĝintaj samideanoj de la samaj progresemaj ideoj ĉiulande klopodas pri la kulturaj celadoj. Alia grava instituto estis fondita dum la tutmonda ekspozicio en Bruxelles: la Centra Instituto Internacia kaj la Centra Instituto Bibliografia, pri kies tasko kaj laboro ni parolis jam la pasintan jaron.

Esperanto-Verlag **Möller & Borel** en Berlin sciigas al ĉiuj siaj amikoj, ke ĝi kuniĝos la 1. de aŭgusto sian firmon kun tiu de s-o Friedrich Ader el Dresden sub la firmo A d e r & B o r e l G. m. b. H. La sidejo de la nova firmo estos en Dresden.

Malpura propagando. En Germanujo oni plendas pro tio, ke malamikoj de Esperanto, la kelkaj partianoj de ĉiam perfektigotaj sistemoj (Ido ktp.) uzas por altiri la atenton de publiko la plej malĝentilan manieron: Sciante bone, ke la nomo „Esperanto" estas hodiaŭ konata de ĉiu, eĉ se la lingvo mem ne estas ankoraŭ sciata de ĉiu, ili anoncas en la jurnaloj senpagan alsedon de e s p e r a n t a lernolibro. Kiu skribas laŭ la donita adreso (poste rest.) ricevas e r a r p l e n a n gramatikon pri Esperanto kun lernolibro pri Ido kaj almetita flugfolio „informas" lin pri sensignifeco de Esperanto. Por la nepetita lernolibro de Ido li estas devigata pagi 1 M se li ne resendas ĝin. Ke „la celo sanktigas la rimedojn" estis ofte dirite, sed ke Esperanto devas labori kontraŭ tiel malhonestaj rimedoj, tion apenaŭ oni kredus. Cetere ni povas trovi analogian fakton en nia nacio mem: areto da partianoj de s-o Kajš, kiu ankaŭ konsideras Esperanton malbona kaj pliboniginda laŭ sistemo Ido (laŭ kioma?), fondis ian unuiĝon sub nomo „Federuro di cheka idisti". Sed en la bohema „traduko" la vera nomo „idisti" estas ellasita, por ke la publiko estu trompata: „Federace českých přátel jazyka mezinárodního" t. e. „Federacio de bohemaj amikoj de la lingvo internacia." Same rilate la gazeton, en kiu la leganto trovas provizon da malĝentilaj insultoj kaj ofendoj adresataj al Esperantistoj; ĝia titolo — „Jazyk mezinárodní" (t. e. „Lingvo Internacia"). Iam aperadis en unu boh. ĵurnalo anoncetoj de s-o J. F. Khun, la nuna prezidanto de tiu ĉi unuiĝo, kies teksto parolis sole pri „Světomluva" (t. e. Mondlingvo). La stilistoj de tiaj tekstoj bone scias, ke la legantoj ignorus ilian senvaloran klopodon, se ili montrus tuj sian „koloron" kaj tial, preferante kaŝi la prave ridatan nomon de reform-idoj, ili uzas sur siaj publikaĵoj la vortojn E s p e r a n t o reformita, Lingvo Internacia. Esperant i s m i s t o j! Iru, prediku al tiuj ĉi amikoj (?) de helpa lingvo pri ĝentileco kaj eĉ se ili ne aŭskultos vin, tamen konsideru ilin amikoj, samideanoj, kiujn la sama celo — propagando de helpa lingvo — ligas kun vi. Ni, Esperant i s t o j, konkludas laŭ la suprediritaj faktoj, ke homoj tiel kondutantaj ne estas niaj amikoj.

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

O jménech vlastních v překladu Bible: (K dotazu z řad čtenářů.) Jména nejčastěji užívaná, která odpovídají ostatně svým tvarem i jménům českým, tak že netřeba uváděti jejich překlady, jsou: Aaron, Adamo, Abram - Abraham, Abimeleĥ, reĝo de Filiŝtoj, Benjamen, Edeno, Esav, Evo, Faraono, Gomora, lando Goŝen, Habel, Hagar, Ĥam, monto Ĥoreb, Isaak, Izmael, Jakob, Jafet, Jehuda, Jordan, Josuo, Jozef, Kanaan, Kain, Metusala, Mezopotamio, Moseo, Noa, Potifera, Raamses, Raĥel, Rebeka, Sara - Saraj, Saul, Sem, monto Sinaj, Sodom, Egiptujo (tehdejší země), Egipto (Egypťan), Eternulo (Hospodin). K těmto tvarům, které končí souhláskou, nutno ve čtvrtém pádě připojiti *-on*: Abrahamon, Sodomon, Esavon a pod., jinak pouhé *-n*: Adamon, Noan, Evon, Rebekan, Saran. (Dosud byly vydány tři knihy: Genezo, Eliro, Levidoj po 2 K. Hachette & Cie, Paris).

Pri la vorto „krom": La prepozicio *krom* esprimas *per si mem* nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur *apartigon*, sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem. - **O slově „krom"**: Předložka *krom* nevyjadřuje *sama sebou* ani výjimku ani přídavek, vyjadřuje pouze oddělení; zda však toto oddělení jest prováděno proto, aby něco bylo odstraněno nebo naopak, aby to bylo více zdůrazněno, to naznačuje smysl věty samé.

Pri „aro": Aprobinda estas la konsilo uzi la sufikson *ar* por esprimi aron da tiaj objektoj, kiuj estas esence ligitaj inter si kaj prezentas ian unuecon, kolektivan objekton (ekz. *vortaro, arbaro, homaro*), sed por ia nombro da samspecaj objektoj, kiuj ne estas esence ligitaj inter si kaj ne prezentas kune ian unu ideon, estas preferinde uzi la esprimon *aro da* (ekz. li ellernis *aron da vortoj*; tie kuŝis *aro da* dehakitaj *arboj*). - **O „aro"**: Lze schváliti radu, aby bylo užíváno přípony *ar* k vyjádření souhrnu takových předmětů, které jsou v podstatě vázány mezi sebou a představují jakýsi jednotný, souhrnný předmět (na př. *vortaro* - slovník, *arbaro* - les, *homaro* - lidstvo), avšak pro nějaký počet předmětů stejného druhu, které podstatou nejsou mezi sebou vázány a nepředstavují společně jakýsi jediný pojem, jest spíše záhodno užívati výrazu *aro da* (na př. li ellernis *aron da* vortoj - naučil se řadě slov; tie kuŝis *aro da* dehakitaj *arboj* - tam ležela hromada poražených stromů).

Pri „al" anstataŭ akuzativo: Oni preskaŭ ĉiam povas anstataŭi per *al* kun nominativo la akuzativon de direkto, kvankam *al* ordinare montras nur la *celadon*, la *direkton* al iu loko, dum la akuzativo povas enhavi en si ankaŭ la ideon de *atingo* de la celo. - **O „al" místo pádu čtvrtého**: Skorem vždy jest možno nahraditi čtvrtý pád směrový předložkou *al* s pádem prvním, ačkoliv *al* obyčejně ukazuje jenom *směřování, směr* k nějakému místu, kdežto 4. pád může obsahovati také pojem *dosažení* cíle.

PROPAGATORŮM.

Námitka 12. **Umělý jazyk rozpadne se rychle v dialekty a různost jazyků nastane opět.**

Jest historickým faktem, že jazyky přirozené před dávným časem rozpadly se v různé dialekty jen když jejich příslušníci rozptýlili se tou měrou, že pozbyli vzájemného styku. Nelze si představiti jak a proč mělo by se tak státi i s Esperantem. Naopak lze pozorovati, že nyní v zemi obývané pouze jedním národem, v níž jest užíváno pouze jednoho jazyka, dialekty mizí vlivem hlavního jazyka národního (mluvy spisovné). Rovněž mezinárodní styky dávají živým jazykům příležitost vzájemného směšování, tak že dík usnadnění těchto styků lze se spíše obávati, že jazyky národní se stále víc a více budou porušovati a že nátlak přirozených potřeb dá konečně vzniknouti jednomu jazyku, hrozné směsi všech řečí živých. Esperanto přináší v tom ohledu spásu živým jazykům, s podmínkou, že se do nich nebudou zaváděti slova esperantská. Naopak jest rovněž třeba, aby byla zachována hlavní jeho kvalita, t. j. nesmějí se zaváděti do Esperanta slova nebo tvary ryze národní. První podmínce lze při trochu pozornosti snadno vyhověti. I druhou bylo by lze snadno splniti, kdyby Esperanta bylo užíváno co nejhojněji, protože tvar nebo slovo nemezinárodní, nepochopitelné většině adeptů jazyka, nemůže zůstati v jazyku stejně jako v živých jazycích neoblíbené slovo se nevžije.

IOM DA INSTRUO.

La Sueza kanalo.

Jam en la antikva epoko estis provite komunikigi la Mediteraneon kun la Ruĝa Maro. Ĉe Herodoto oni legas, ke la egipta reĝo Neĥo eklaboris super tiu ĉi verko, kiun li tamen ne finis. Post cent jaroj plenumis ĉi tiun laboron Persoj. Ĝis hodiaŭ konserviĝis kelke da ŝtongravuraĵoj, kiuj rakontas al ni, ke dum la regado de Dario estis la Sueza kanalo malfermita. Tiu ĉi unua kanalo konserviĝis ĝis la oka jarcento kaj la Araboj, importantaj grenon el Egiptujo, multe ĝin uzadis. En la j. 1854 proponis la franca inĝeniero Leseps al la egipta vicreĝo siajn servojn. Post du jaroj li ricevis permeson rekonstrui la kanalon kaj li fondis societon, kies tasko estis kolekti la bezonan kapitalon. Sed ĉar Angloj ĉiel malhelpadis la aferon, oni povis eklabori nur post pluaj tri jaroj. La ĉefa merito pri efektivigo de la planoj de Leseps apartenas al la egipta vicreĝo, kiu krom rimarkinda monsubteno disponigis al la afero 25.000 indiĝenojn. Post dek jaroj estis finlaborita la grandega verko, kiu kostis preskaŭ duonmiliardon da frankoj; tiu ĉi sumo kolektiĝis plejparte per akcioj. En la komenco posedis ²/₃ de tiuj ĉi valorpaperoj Francujo, ¹/₃ la egipta vicreĝo, sed pli malfrue Britujo, vidinte la gravecon de tiu ĉi komunikilo peranta komunikon kun Hindujo Orienta Azio kaj Aŭstralio, foraĉetis plimulton de la akcioj. Hodiaŭ oni trapasas preskaŭ senescepte la kanalon, kvankam la depagoj estas sufiĉe grandaj: ĉiu ŝipo devas pagi por tono 8 Fr. 50

etm, 10 Fr. por vojaĝanto maturaĝa, 5 Fr. por infano. Ĉe grandaj ŝipoj atingas la depago multe da miloj, sed la ŝparo de tempo, karbo k. t. p. estas tamen tiom rimarkinda, ke ĉiu ŝipo preferas pagas ĉi tiajn elspezojn.

Král a mudrci.

Jeden král povolal šest nejmoudřejších mužů své země a nařídil jim, aby každý vyřkl otázku, kterou nechť druhý zodpoví a na tuto odpověď nechť pak dá tázavší se ještě vtipnější odpověď. Kdo při tom dá na jevo nejvíce vtipu, toho chtěl král vyvoliti svým rádcem. První mudřec se ptal, co jest těžší nežli země. Druhý mu odpověděl: Hněv lidí. Ne, řekl první, hněv boží. Druhý se otázal, co jest na světě nejlepší. Dobrý přítel, odvětil první. Dobré svědomí jest ještě lepší, opravil tazatel. Třetí se ptal, kdo jest nejmoudřejší. Ten, kdo přečetl nejvíce knih. Nikoliv, nejmoudřejším jest ten, kdo přečetl jen dvě knihy: Bibli a knihu přírody. Čtvrtý se ptal, kdo jest nejbohatší. Kdo má nejvíce zlata. Ne, ale ten, kdo nejméně potřebuje. Pátý: V čem spočívá největší čest? V udatnosti a vědění. Nikoliv, ale v pokoře a mírumilovnosti. Poslední se tázal: Co jest největším uměním? Vládnouti lidu. Ne, ale ovládati sebe sama. Král pochválil všechny, hlavně ale posledního, neboť rozuměl, že skutečně sebeovládání jest největším uměním a jmenoval posledního mudrce svým rádcem.

(*Přeložte a srovnejte s esperantským textem v příštím čísle.*)

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

La ĝenerala kunveno de Centra Asocio de B. U. E. okazinta la 29. de junio en la esp. kancelario en Praha aprobis unuanime la raportojn de la komitatanoj kaj nomis kiel honorajn membrojn s-on Lord Mayor Sir Vezey Strong kaj la prezidanton s-on prof. dr. V. Rosický, lernejan konsilanton. Detala raporto pri tiu ĉi kunveno aperos en nia proksima numero. — La ekzamena komisio kunsidis por la dekdua fojo la saman tagon matene. La ekzamenon plenumis s-oj: ĉefleŭtenanto K. Hollegcha, ĉefserĝento J. Plánský, ĉefserĝento T. Plánský, s-o H. Veselka (ĉiuj en České Budějovice) kaj s-o V. Havel, fabrikanto en Blatná. Laŭ la decido de la ĝenerala kunveno estos la ekzamena regularo reviziita kaj la ekzamenoj estos de post nun pli severaj.

Esperantista Klubo en Praha (Vodičkova ul. 38.) atentigas ĉiujn membrojn, ke laŭ la decido de la lasta komitata kunveno estos la biblioteko disponebla sole por tiuj membroj, kiuj deponis garantian sumon 2 K (same kiel en la urba biblioteko). Sole tiel oni povos eviti kaj malebligi la perdojn, kiujn la biblioteko suferis en la pasintaj jaroj. La libroj (maksimume du) estas pruntedonataj por du semajnoj.

El Ameriko. Nia transmara samnaciano s-o R. Honomichl en Omaha sendis al ni kelke da n-oj de „Osvěta Americká", en kiuj li publikigas regulan esperantan kronikon sub la nomo „Besedy esperantské". En alloga maniero prezentata gramatiko estos bazo por la esp. artikoloj, kiuj sekvos. Preskaŭ du kolonoj estas ĉiam dediĉataj al liaj interesaj informoj per kiuj li multe servas nian aferon inter la amerikaj Bohemoj. Ni elkore deziras al li sukceson kaj sendas al liaj legantoj fratan saluton el ilia patrujo!

La 27. de majo okazis en **Přerov** internacia kongreso esperantista, kiun partoprenis 37 personoj. La partoprenintoj elmontris siajn alportitajn esperantajojn, kiuj altiris atenton de kelkaj urbanoj. Kiel honora prezidanto estis elektita s-o JUDr. František Barvič; la kunsidon prezidis s-o direktoro J. Zlámal, en nomo de Poloj parolis s-o Fr. Skulina, de Germanoj s-o Rud. von Lidl. de Bohemoj f-ino M. Minaříková. Oni pritaktis demandojn propagandajn, organizajn, kongresajn k. a. Estis konsentite, ke la krakovaj kongresanoj estu atentigitaj pri Moravio kaj la banloko Luhačovice pere de jurnaloj kaj de broŝuro laŭeble eldonota. Oni akceptis la proponon fondi specialan organizajon moravian por specialaj bezonoj de propagando en la lando kaj postuli ĉe UEA, ke Moravio kun Silezio estu memstara distrikto (ĝis nun kun Bohemujo). Oni proponis ankaŭ organizon de slava kongreso esperanta en Moravio 1913, sed la propono ne trovis subtenon. Al dr. Zamenhof estis sendita saluta letero kaj la kongresanoj honorigis memoron de J. A. Komenský per solenaj paroloj antaŭ lia monumento. Estas projektata por la proksima jaro refoje simila kongreso.

Internacia organizajo de **studentoj**. Kvar, kvin, eble jam ses tutmondaj esp. centroj studentaj naskiĝis kaj preskaŭ ĉiu, kompreneble, nepre devis posedi sian organon. Unu post la alia kune kun la organo formortadis kaj formortas. Tiun ĉi jaron projektas la Ĉiostudenta Asocio okaze de la Kongreso en Kraków ĉesigon de sia ekzistado kaj de sia organo „Ĉiestudentaj Interesoj", kiu ĝis nun en siaj kvaronjaraj 16-paĝaj n-oj eĉ ne unu linion dediĉis al la movado studenta (oni ne povas tion riproĉi, ĉar nek la redaktoro, nek iu de la gvidantaj komitatanoj de Ĉ. A. estas studento). — S-o prez. Mareš (red. de Ĉ. I.) proponas kaj rekomendas al la progresema studentaro fondi Universalan Studentan Asocion (takon de UEA) kaj ŝanĝi la Ĉ. A. je „Corda Fratres". Se iun la demando interesas, skribu al s-o Mareš (Luhačovice).

Pro teknikaj kaŭzoj ni devas prokrasti la publikigon de raportoj el la ceteraj urboj kaj la fakon BIBLIOGRAFIO.

KORESPONDANTOJ: *79. S-o Gorgues *Barcelona*. Orteu 6. (Ruĝa Kruco) Hispanujo (il. k.). — *80. S-o J. B. Dennis Rakotondranisa instruisto. *Ambositra*. Madagascar. Afriko (il. k.). — *81. S-o Santos Ortez de Arri, *San Sebastian*, str. Quetaria 10. Hispanujo (dez. por la eksp. esp. presajojn). — *82. S-o K. Golaas, *Frondhjem*, Valdgaden 3. Norvegujo (il. k.). — *83. S-o Jaime Armengol, *Sabadell*, Str. Cruz. 43. Hispanujo. — *84. S-o A. De Puydt. stud. *Arendonck*. Belgujo. — *85. S-o E. M. Bruno Riefling, Aars og Voss Skole, *Kristiania*, Norvegujo. — *86. S-o Al. Kozlov. *Tomsk*, Kondratjevskaja ul. d. 4. kv. 2. Rusujo (dez. kor. per. il. k. kun konstantaj koresp. pri la lokaj moroj, popolkutimoj). — *87. S-o N. V. Sičov, *Orel*, Puškarnaja 3. Rusujo (dez. kor. pri gimnastiko). — *88. S-o John F. Kendrick, *South Whitley* Indiana U. S. A. Box 182 (ĉiam resp.). — *89. S-o Cap. Saint-Jacques, 1er Régiment de Tirailleurs Annamites, Jouvion Louis, Cochinchine française (il. k.). — *90. S-o Humberto Chaves, R. Mancel Victorina, *Rio de Janeiro* 575. Piedade. Brazilio (il. k.) — *91. S-o Buja, horloĝisto, *Cholet*, pl. Travot, Francujo. — *92. S-o Rud. Honomichl, **1431**. So. 14-th Str. *Omaha*, Nebraska. North Amerika (il. k., kor. angle, esp., boheme, germane). —

Příští číslo (7.) vyjde začátkem srpna!
O prázdninách „Č. Č. E." nevychází, tudíž
nereklamujte v září č. 8.

SOKOLSKÝ SLET V PRAZE, který těšil se imposantní účasti a vyvolal neobyčejný ruch v Praze i ve všech obcích českých zemí, odkud sjížděly se řady účastníků, zůstane jistě na dlouho v paměti českého lidu, jako událost opravdu mimořádná. Mimo živých povznášejících dojmů odnášel si zajisté každý návštěvník Prahy i jakousi drobnou památku, která bude mu vždy milou upomínkou na slavné a rušné dny sletové. Originelní a vkusnou upomínku připravila návštěvníkům Prahy První česká všeobecná akciová společnost pro pojišťování na život, v Praze (naproti Národnímu divadlu), vydavši krásné dopisnice se slovanskými typy dle obrazů mistra Dědiny. Na dny, kdy Praha hostila tisíce slovanských hostí, budou jistě tyto rozkošné Dědinovy Slovanky v národních krojích památkou nejživější.

Připomenouti dlužno také, že slovanským hostům, zvláště Chorvatům, ubírajícím se při svém příjezdu kol kanceláří První české dostalo se nadšeného uvítání a jak poznamenávají ve svých referátech denní listy, zasypáni byli odtud deštěm květů.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.